V-19563 doi.

# La Skolta Mondo



vol. 5

apr -jun 1978 nr-o 10

# S E L

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
Zaandam Nederlando.
Poŝtĝirkonto 54 36 47
************

Fondinto "Avoto", A.W. Thomson.
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, D.H.Davis, L.J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11, Norvegujo.
Telefono 02-283035

Sekretario: J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam 1400, Nederlando.
Telefono 075-166931

Kasisto kaj Administranto de L.S.M.:
David H. Withey, 21 Brookfield Ave. Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono 051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien, Norvegujo. Poŝtkto 8030413, Tel 035-21848.

Membroj de la Centra Komitato:
Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave., Paterson, NJ 07531, Usono.

Ŝindo- Seitaro, Nisi-mikuni-1-tyôme 200, Higasi-yodogawa-ku, Osaka-ŝi, Japanujo.
*************


Skolta Esperanto-Ligo eldonis:

Ĵamborea Lingvo (lernolibro).

Skolta kaj Tenduma Terminaro.

Ĵamboreaj Notoj (priparolo de la 14 ĝisnunaj ĵamboreoj. Esp.lingva)

Jamboree Story (Sama en angla)

Pli vasta horizonto (informa kaj ideo-dona libreto eldonita en la lingvoj angla, araba, franca, germana, japana, hispana, nederlanda kaj norvega.)

La dato hodiaŭ estas la 20.a de Majo. Jam tri tagoj pasis post la granda festotago de norvegoj kie ajn ili estas: La 17a - ne ne bezonas diri pli. En tiu tago montriĝas ĉiuj sentoj, kijn ni tiel zorge kaŝas dum la aliaj tagoj de la jaro. Muziko, flagoj kaj gajaj koloroj: Kiu ne mem spertis la tagon, neniam kredus ke tio estas festomaniero de la norvegoj.
Sed la kaŭzo estas unika: en tiu tago Norvegujo ricevis kaj sian leĝon konstitucian kaj sian liberecon! Kaj ni lernis: Sen la leĝo la libereco ne ekzistas!

Ĉi tiu numero de LSM altgrade montras, ke la redaktoro estas norvego. La kovrilbildoj ambaŭ estas el Norvegujo: norvega naturo kaj norvegaj skoltoj. Kaj vi trovas artikolon pri norvega muzeo kaj pluajn du bildojn de norvegaj skoltoj

Eble mi devus pardonpeti. Sed mi ne faros!
Ĉar laŭ mia kapablo - t.e. laŭ la materialo, kiun mi ricevis de aliaj partoj de la mondo - mi donis bildon de la skolta mondo - kaj se mi povas nenion vidi, krom Norvegujon, vi devas malfermi miajn okulojn. Estas neeble al mi trovi la materialon aktualan el aliaj landoj!

Mi diris tion pli frue, kaj mi ripetas:
Nia gazeto fariĝos tiel bona aŭ malbona, kiel vi mem deziras!

Kaj nun -ekspedante la gazetajn manuskriptfoliojn al la presejo mi vola nur aldoni:
Feliĉan someron!

Hans Amund

# Jarraporto

La jaro 1977 estis por nia Ligo stranga jaro, pro la malekvilibro inter la kresko de nia influo eksteren, kaj la samtempa malfortiĝo de nia interna organizado.
Al la Skolta Movado ni helpis per la eldono de la libreto "Vastaj Horizontoj" por stimuli la internacian kunlaboron. Ĝi aperis en la lingvoj angla, franca, germana, japana, hispana, nederlanda kaj norvega.
Per helpo de la geskoltaj Mondaj Oficejoj en Londono kaj Genevo ĝi estis sendita al ĉiuj aliĝintaj skoltaj asocioj, en pli ol 100 landoj en la mondo. La libretoj aspektis moderne kaj alloge - nur la japana eldoni havis iom malpli bonan kvaliton.
Ili certe taŭgas por disvastigi la konon pri Esperanto kaj SEL en skoltaj medioj.
Bonaj planoj por aktivigi la tutmondan esperantistaron en la disvastigo inter la skoltoj, ne realiĝis, kvankam en kelkaj landoj estas feliĉigaj esceptoj.
La eldonaj laboroj estas daŭrigataj por la kataluna kaj araba tradukoj. La multaj kromlaboroj iom malhelpis la sekretarion por plenumi la normalajn taskojn.
Entute ni povas esti kontentaj pri la evoluo de nia laborprogramo.

*

La SEL-kunveno en Reykjavik dum la Universala Kongreso bone sukcesis. La prezidanto faris utilajn kontaktojn kun aliaj fakasocioj kaj kun UEA.

*

La interna situacio de nia Ligo estis malpli kontentiga. Financaj problemoj pro la valorŝanĝo de la brita mono, kaj personaj devoj de la redaktoro estis la kaŭzoj ke nur tri numeroj de la revuo aperis.
Intertempe ni venkis la malfacilaĵojn kaj atendas la saman senriproĉan aperadon al kiu ni jam dum tiom longa tempo kutimiĝis.

Tre ĝenis nin la disrompiĝo de nia reto de Naciaj Reprezentantoj kaj kunlaborantoj.
Malaperis la NR-oj en Aŭstralio, Britujo, Maroko kaj Portugalujo. La germana ankoraŭ ne aktivas, la brazila, franca kaj irlanda dum kelka tempo ne funkciis. La nomiĝo de NR en Mekzikio evidente montriĝis eraro: li neniam vere aktiviĝis.
La kialoj preskaŭ ĉiam estis personaj aferoj: translokiĝo, nova profesio, malsano, akcidento ktp.
La nura positiva konstato povas esti, ke la kaŭzo neniam estis kverelo aŭ malharmonio interne de nia Ligo.
Al ĉiu ni donas nian plej koran dankon pro la farita laboro, kaj bondezirojn por la estonteco.

## Malgrandaj Notoj

Finnlando bonvenigas al Esperanto studsemajnoj en Ylitornio en la Suda Laplando 12.-16. junio 1978, kaj en Vääksy en suda Finnlando 16.-22. junio kaj 8.-16. julio 1978. Adreso:
IsCe-KoKe, SF 17 300 Vääksy, Finnlando.

*

En mezgrada lernejo en la Sovetunio fondiĝis Esperantista Klubo de Internacia Amikeco, kaj la membroj deziras korespondi kolektive kaj persone. La komuna adr. estas:
Esperanto-K.I.D., ŝkola N 16, Bitha, 354054 Soĉi Sovetunio.

*

Internaciaj Floraj Ludoj aranĝiĝos post 42-jara ĉeso en Hispanujo. Oni invitas alsendon de:
a. ama poemo.
b. priesperantisma poemo
c. Humanisma aŭ etika poemo
en la poezia branĉo, aŭ rakonto, novelo, eseeto ĝis 2-3000 vorta en la proza branĉo.
Verkojn sendu (po 4 ekz tajpitaj je duobla interspaco) al Gabriel MORA i ARANA, str. Carrió,5, 4, Manresa (Barcelona), Hispanujo ĝis la 31.a de junio 1978.

*

Tadeusz Goebel, skoltestro en Pollando, dez. korespondi kun geskoltoj precipe en Nederlando.
Li deziras interŝanĝi esperantaĵojn, emblemojn kaj memorigilojn pri

skoltaj eventoj ktp.
Adreso: Str Kościuŝko 13/2, Pl 89300 Wyrzysk.

*

Al la 63-a Universala Kongreso en Varna jam (fine de februaro) aliĝis pli ol 2100 kongresanoj, tiel ke ĝi verŝajne estos la dua plej amasa.
SEL mendis lokon por sia kunveno, kaj esperas ankaŭ alimaniere montri sian vizaĝon al la kongresanaro.

*

La Turisma Servo de TEJO eldonis malgrandan kajeron sub la nomo: Turisma Esperanto Kalendaro 1978. EN ĝi estas informoj pri okazontaĵoj esperantistaj dum la tuta jaro. Konsilo: Vi mendu jam nun kalendaron por la venonta jaro!

*

Jean Pierre DESTREBECQ estas instruisto pri historio, kaj verkos libron historian pri la skoltado en la landoj de Orient-Eŭropo.
Li volonte korespondos kun ĉiu, kiu povas doni informojn pri tio.
Adreso: RueJulesCornet 25-3, B 7000 Mons, Belgujo.

*

IBRA radio, kristana radio de pentekostanoj elsendas ankaŭ per nia lingvo. Dum la monatoj julio, aŭgusto kaj septembro nia redaktoro, Hans Amund Rosbach, en 10 sinsekvaj mardoj faros 10-minutajn paroladojn pri la surmonta prediko de Jesuo.

Specialan dankon ni donas al Charles Bardsley, kiu (se la arkivoj ne trompas nin) servis al la Ligo dum 50 jaroj en diversaj funkcioj.

*


La jarraporto klare montras al ni kion ni faru en la venonta tempo:
1. Plifortigi nian organizadon.
2. Utiligi la eblecojn de nia eldona aktiveco.

Zaandam, 1978 01 31

Por la Centra Komitato
John Berggreen
Ko Hammer.

# SEL en la 3a Azia-Pacifika ĵamboreo

La 3a Azia-Pacifika Ĵamboreo okazis de la 4a ĝis la 11a de januaro 1978 en la eta urbo Oamaru en la suda insulo de Nov-zelando.
Partoprenis 7000 skoltoj, plejmulte el Nov-Zelando. Ĉeestis 9 eksterlandaj kontingentoj kaj individuaj skoltoj el diversaj landoj.
Laŭ instigo de Nov-Zelanda Esperanto Asocio SEL




organizis standon por informado. Ĝi estis en tendego nomita "Centro de Internacia Amikeco", en kiu la eksterlandaj skoltgrupoj prezentis sian landon. La laboron faris Dennis Pease kaj s-ino Gwenda Sutton, kiuj ĉiutage deĵoris de la 10a ĝis la 17a horo.
Tre bona por allogi la homojn estis kolekto de skoltaj insignoj, kiun Dennis kunprenis de la Monda Ĵamvoreo en Norvegujo.
Surprize multaj personoj neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto. Tiuj, kiuj montris intereson, povis skribi nomon kaj adreson en kajeron por



d.z 3/93

por posta informado. Tion faris 200 personoj inter kiuj 20 eksterlandanoj.
El la enloĝantoj de Oamaru tiom multaj montris intereson, ke oni fondis Esperantokurson sub gvido de s-ro D J Munro.
Vendiĝis 100 ekzempleroj de la libreto "Wider Horizons". La japanlingvan eldonon oni disdonis senpage.
Pluraj altranguloj el la Skolta Movado vizitis la standon. Ili ĉiuj ricevis ekzempleron de nia libreto.

Interesa partoprenanto al la ĵamboreo estis s-ro Hamid Ghadamary, reprezentanto de la Irana Skolta Asocio, kiu venis por observi la ĵamboreon. Liajn spertojn oni utiligos por la aranĝo de la venonta Monda Ĵamboreo en Irano. Ni esperas ke li mencios la internacian lingvon en sia raporto.

Salutleteroj al la kunlaborantoj de SEL venis de mirige multaj Naciaj Reprezentantoj kaj membroj de la Centra Komitato, kaj Gwenda kaj Dennis tutkore dankas pro ili.

Post la ĵamboreo oni respondis al ĉiuj, kiuj petis informojn.
La Nov-Zelanda Esperanto Asocio pagis la afrankojn por tio, kaj gesinjoroj Wood afable prizorgis la skribadon kaj presadon de cirkuleroj

# ni ricevis


leteron de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kiu volas atentigi pri si mem: NEM ne estas asocio; ĝi ne havas membrojn, ne havas estraron NEM estas malfirme organizita kunlaboro de homoj, kiuj opinias pri UEA, ke ĝi forlasis la neŭtralan linion.
NEM havas organon Horizonto, kaj aranĝas ĉiujaraj internaciaj konferencoj. La 4a okazos en Jaca en Hispanujo en julio 1978.

# LA FERVOJMUZEO
## HAMAR NORVEGUJO

estas unika muzeo: La dungitoj - kiuj estas dungitaj kaj pagataj de la ŝtataj fervojoj estas esperantistoj! Ambaŭ!

La kolektaĵo da lokomotivoj konsistas el 5 normaltrakaj vaporlokomotivoj kaj 4 mal-larĝtrakaj krom de 2 de la Urskog-Hølandlinio. La plej granda estas «Dovregubben» — «La Dovrepatro», kiu kun karbo kaj akvo pezas 157 tunojn. La plej malnova lokomotivo estas konstruita de Robert Stephenson en 1861. Dum la 100-jara jubileo de la fervojo en 1954, ĝi briliĝis kaj transportis la publikon al kaj de la granda fervojekspozicio en Oslo. Ankaŭ la malnovaj stacidomoj de Ilseng kaj Bestum estas lokigitaj en la muzeon. En ĉiuj stacioj estas atendejoj kaj kontoroj tiel kiel ili estis en malnovaj tempoj. En la dua etaĝo de Bestum stacio ankaŭ estas aranĝita staciestro-loĝejo kun ekipaĵo de la 1890-jaroj.

La 3 stacidomoj etstas lokigitaj laŭ fervojtrako kiu estas ekipita kun flankentrakoj, malnovaj pintreloj, signalmastoj kaj malnova barilo. Ĉe Kløften stacio staras gazetkiosko de 1884, kaj en la perono de Ilseng stacio ni trovas la unuan kioskon de Narvesen de 1894.
En la lokomotiv-kaj vagonhalo ankaŭ estas kolektitaj longa vico da vagonoj i. a. normaltraka kaj mallarĝtraka reĝvagonoj, kelkaj, «karetoj», 4-klasa vagono nur por starantoj, malnova sanitarvagono kaj multe da aliaj objektoj.
En la muzedomo troviĝas 2 ekspoziĉiĉambregoj kun i. a. multaj belaj modeloj, krome legĉambro kaj biblioteko kun pli ol 7000 volumoj da libroj kaj ca. 3000. manskribaĵoj, — 35000 fotoj, desegnaĵoj k. t. p.



# 1 2 3




Evoluo de hindaj ciferoj el praaj hindaj enskriboj tra arabaj kaj eŭropaj manskriboj ĝis la modernaj ciferoj.

Kompreneble ni konas la suprajn simbolojn. Sed ni ne ĉiam konis ilin - Se malgranda infano kun tri ludiloj "perdas" el tiuj unu, ĝi ne rimarkas tion. Sed se iu forprenas ankoraŭ unu, ĝi tuj laŭtvoĉe protestas. Ĝi scipovas nombri ĝis du!

Verŝajne la homoj en tre primitiva stato havis ian kalkulokapablon jam antaŭ ol koni ciferojn, sed ni konas tribojn al kiuj ciferoj pli altaj ol kvin estas nekonataj. En pluraj praaŭstraliaj lingvoj ne ekzistas nomoj por ciferoj pli ol ĝis kvar, kaj pluraj triboj ne povas uzi siajn de fingrojn por kalkuli. En malaja lingvo la vorto de "ses" priskribis ses ŝtonojn. En zulua la vorto estas "tatisitupa, t.e. "kunprenas la dikfingron", ĉar li nun foruzis la kvin fingrojn de la maldekstra mano, kaj komencis per la dikfingro de la dekstra. La vorto "sep" estas "u kombile", t.e. "li montras", - ĉar nun li uzas la montrofingron.

Ne tute senbaze ni povas legi la ŝercon el lernejo: La nova instruisto provas klarigi al infano kalkulon: Se vi havas kvin oranĝojn, kaj donas unu al Petro, kiom vi poste havas? Sed la infano respondas: Ne, tion mi ne povas kalkuli. Ni ĉiam uzis pomojn antaŭe.

Strange estas kiamaniere la kalkulosistemoj evoluiĝis. La plej frua estis bazita sur du. La afrikaj pigmeoj diris: a (unu), oa (du), ua (du-unu), oa-oa (du-du) oa-oa-a, oa-oa-oa ktp.





Fruaj siriaj ciferoj, kiuj estas laŭ la sistemo bazita sur du.

Ni ankaŭ povas en lingvoj trovi rememorojn pri sistemo bazita sur tri, kiam la vorto tri fakte signifis "multaj". Ekzemploj estas la latina "ter felix" (feliĉega), la greka "tri megistos" (grandega) - kaj ankaŭ la franca "tres bien" (bonege) aŭ nia propra "tre". Ni ankaŭ havas dekdu-sistemon, kiu parte ankoraŭ vivas, kie unu dekduo (en la norvega "dusin") estas la unua ŝtupo, dek-du dekduoj (la norvega esprimo estas "gross") la venonta. Kaj - unu "futo" enhavas dekdu "colojn" - en mezursistemo prenita el la homa naturo: la "futo" estis piedlongo, kaj "colo" la longeco de la dikfingro.

En pluraj lingvoj ni retrovas la dudeksistemon, i.a. en la franca kaj en la dana. En la dana sesdek nomiĝas "tres", aŭ pli precize "tresindstyve" kio signifas "trifoje dudek". Kaj pro tio kvindek nomiĝas "halvtreds" - "duone ĝis trifoje dudek", dum sepdek estas "halvfjerds", t. e. "duone ĝis kvarfoje dudek". Ankaŭ en la norvega tiu sistemo fakte ankoraŭ vivetas, almenaŭ kiam temas pri ovoj, tre ofte vendataj en "dudekoj", en la norvega "snes".

Sed kuriozaĵo estas rimarki, ke la novaj elektronaj kalkulmaŝinoj ja reiris al la "du-sistemo". Ĉar tiuj faras ĉiujn siajn kalkulojn per aŭ "ne estas elektra kurento" aŭ "estas elektra kurento". Kaj en tiu sistemo la cifero unu skribiĝus 1 - du skribiĝus 10, tri 11, kvar 110, kvin 111 ktp. Eble la malnova sistemo i,ii,iv x, xi ktp estus same facila?




"Modernaj" ĥinaj ciferoj.



## naturrampado

Estas nova speco de naturstudoj kiu iĝas ĉiam pli kaj pli populara. Tio estas la "naturrampado". Anstataŭ fari "natureks-kurson" vi prenas pligrandigan vitron kaj rigardas al tio, kio estas plej proksima al vi. Tio povas esti arbfolio, herbero, birda plumo aŭ formiko. En pli mallonga tempo ol mi bezonas por skribi ĉi tion, vi trovos, ke vi - rampante sur la genuoj kaj brakoj - malfermis al vi mem tutan novan mondon de miriga beleco kaj aktiveco ĉe viaj piedoj. La "rampado" komenciĝis.
Eĉ sen la pligrandigilo vi surpriziĝos, se vi donos al la naturo vian tutan kaj sendividitan atenton. Nur simple rektu al vi mem la demandojn: Kio okazas ĉi tie? Kial tio estas tia?
Se vi diras: "Nenio okazas ĉi tie, nur la herbo kreskas", sekvu tiun herbon en la teron. La dika plektaĵo el radikoj klarigas la sekreton de la erosio. Ankoraŭ fosu iom, kaj vi trovos eble vermojn aŭ ties truoj, aŭ kungluitajn ovojn de iu insekto - kaj ĉio povas malkaŝi historion ravigan kaj plezurigan al naturdetektivo kiel vi.
Sed ne kontentiĝu per nur kelkaj rapidaj eltrovoj. Se vi fosas en la fundon de la arbaro, vi facile povos trovi milon da kreitaĵoj en nur tre malgranda areo. Ne nur vermojn kaj insektojn, kiujn vi jam pli-malpli konas, sed ankaŭ araneojn, limakojn, helikojn, akridojn, "milpied -ulojn" k.tp.
Sed kial la fundo de la arbaro estas pli riĉa de vivaĵoj ol la herbejo kulturita? Serĉu mem indikojn. Rigardu supren! Nun vi ekkomprenas, ke la arbarfundo ricevas protekton kontraŭ vento kaj pluvo de la umbrelo de la arboj, kaj krome ĝi havas ekstran kusenegon pro la mortintaj arbo -folioj sur la grundo.
La pli supraj partoj de tiu kovrilo donas protekton kaj varmon, sed samtempe la pli malsupraj tavoloj konstante transformiĝas al nutraĵo, kaj nur tre malofte fosado aŭ plugado malhelpas tiun proceson. Tial la malvarma kaj malluma fundo iĝas la idealan mondon de la mini-estaĵoj, - plenan da lokoj por sinkaŝo, kaj plenan da nutraĵo.
La pligrandigilo helpos vin al pli granda kompreno de tiuj bestoj - de ilia nutromaniero, plimultigo, kaj de la defendo. Sed al tio havigu al vi mem ilon kiu pligrandigas minimume dekfoje. Tia pligrandigilo povas montri al vi, ke la fragila korpo de la raŭpo havas peltomantelon, kiu similas al dika tapiŝo.
Per tia pligrandigilo vi povas en la aŭtuno sekvi la verda-al-ruĝa procedo dum vi studas la ĉelojn de la arbfolioj. Ĝi ankaŭ povas klarigi al vi, kial la sablo de unu strando grincas (la sableroj povas havi akrajn pintojn), dum alia strandpromenado nur flustras (kiam la sableroj estas tute glataj).
Kie ajn vi estas, mirinda mondo troviĝas sub viaj piedoj. Ekrampu!

El "World Scouting".

# BONVOLO

Jam la kvindek sepan fojon elsendas la Kimra junularo sian Mesaĝon de Bonvolo al la gejunularo en la tuta mondo. Oni elsendas ĝin al gejunuloj en preskaŭ cent landoj laŭ spirito de paco kaj amikeco. Kiuj volas esprimi siajn opiniojn, bonvolu skribi al:
La sekretario, Goodwill Message, Swyddfa'r Urdd, Aberystwyth, Wales.
La nunjara mesaĝo estas en formo de kanto, verkita de la populara kimra grupo "Hergest". La kanton vi povas mendi en kelkaj lingvoj en kaseto ĉe la supra adreso.

Ni la alian observas de for
Sentas dividan distancon
Sen scio rigardas kaj timas sen kaŭz'
En ni nekompreno kreskadas

Rekantaĵo: Venu! kun preta man'
Ni rompos la murojn dividajn
Venu! Car am' kreskos en ni
Fortiĝas la lumo: al ni estos morgaŭ.

Ni la alian observas de for
Ne vidas ke ĉenoj nin ligas.
Sed nur etendu al ni kun ridet'
Transiros ni barojn dividajn.

Rekantaĵo kiel supre.

Frat' kaj fratin' manon donu
Donu al mi.

Laponaj skoltoj el la sola lapona skoltgrupo de Norvegujo uzas sian tradician nacian vestaĵon. (WS)



# Sirio

Sendis al ni M. Ĥassan T. Mawsily el Damasko, Sirio.

La nomo S i r i o devenis de la Asirianoj, tiu malnova popolo kiu loĝis inter Tigriso kaj Eŭfrato dum la jaroj 879-613 a.K. La asirianaj armeoj invadis la landareojn de Sirio, Libano kaj Palestino ĝis la landlimoj Egiptaj, kaj tiel kreis la malnovan Asirilandon, kies ĉefurbo estis Aŝuro.
La Respubliko Araba Sirio situas en Okcident-Azio ĉe la Mediteraneo. Ĝia areo estas ĉ 186.000 km.kvadrataj, kaj la enloĝantaro ĉ 9 milionoj. Pli ol du milionoj loĝas en la historia ĉefurbo Damasko, kaj tiu urbo, "Dimâŝ Aŝŝám", estas la plej malnov ĉefurbo en la tuta mondo.
Aliaj gravaj urboj estas Alepo, Latakijo, Himso, Hamao, Darao, Rakao k.a. Estas du ĉefaj havenurboj ĉe la marbordo de la Mediteranero (Latakijo kaj Tartuso) kiuj ricevas multajn ŝipojn el la tuta mondo. La plej renoma kaj bela somera marvizitejo estas Rasulbasito. Pluraj turistoj vizitas la antikvajn lokojn en Palmiro, Damasko, Ogarito, Busrao, Malulo k.a.
La ĉefa religio estas Islamo.
Estas mirinde, ke Sirio entenas multajn nearabajn minoritatojn, kaj ĉiu el ili posedas sian propran hereditan lingvon kun kun la uzara arablingvo. Jen kelkaj el tiuj minoritatoj: Kurdoj, Ĉerkesoj, Dagistanoj, Asirianoj, Surianoj, Armenoj, Judoj, Ciganoj.
La rivero Barado transiras la ĉefurbon Damasko, sin dividante al sep branĉoj, kiuj transiras la mirindan Gutaon: la bonplantitan kaj fekundan areon ĉirkaŭ Damasko. Tiu areo entenas milojn da diversaj kampoj, el kiuj la damaskanoj povas aĉeti tion kion ili bezonas da fruktoj kaj legomoj. Ĝi estas tre fama ekde la regno de la Romianoj.
La baraĵego de la rivero Eŭfrato estas unu el la grandegaj projektoj en Sirio. Post ĝia konstruo la elektro alvenis al multaj siriaj vilaĝetoj.
La baraĵo kreis la lagon "al-Asad" kiu entenas grandan fiŝaran trezoron, kaj ankaŭ kreis turistajn vizitejojn. La urbeto Assáurah estas establita ĉe la baraĵo.



La apuda bildo estas unu el la kontribuoj al la skolta fotografia konkurso Arco Photo Contest. Ni prenis ĝin el la revuo World Scouting.



## UNUIĜO

En Norvegujo estis ĝis nun tri skoltaj asocioj, unu knabina, kiu apartenis al la Kristana Asocio de Junaj Virinoj, kaj unu knabina kaj unu knaba neŭtralaj. Nun - je la tago de St. Georgo, tiuj du lastaj unuiĝis, kio i.a. respeguliĝas per la nova koltuko, kiun surprenas la supra paro. Post la unuiĝo restos tamen en la lando tri skoltaj asocioj, ĉar la knabskoltoj de Kristana Asocio de Junaj Viroj, kiuj ĝis nun estis korporacio en la knabskolta asocio, nun eliris - lojale al la knabinoj de la sama Asocio - kaj kreis sian propran skoltasocion. Tiu lasta tamen ne aprobiĝos de la Monda Oficejo.

LA SKOLTA MONDO REDAKCIO: Bambleveien 2
N 3700 Skien

NE ISSN 0037-6558

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL